



**FLANDRA
ESPERANTISTO**

MONATALE REVUO

**ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO**

SUR LA SOJLO DE 1940. — KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO. —
80 JAROJ PISIS. — DANCANTA PECJO. — KANTO POR SI. —
LA STUDANTO. — LIBERA TRIBUNO. — LA SERCIGEMULO
PAROLAS. — DIVERSAJOJ. — INTER NI. — ANGULO DE LA
SERCEMULO. — LA REDAKCIO RESPONDAS. — ENHAVO
DE LA JARKOLEKTO 1938-1939.

**Orgaan van den
VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND**

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
FL. L. E. (Vlaamsche Esperantisten Bond) FL. L. E.

HOOFDBESTUUR :

Voorzitter : Dr. Th. VAN GINDERTAELEN, Stefaniestraat 44, Antwerpen.
Ondervoorzitter : G. BAUMERS, Korte Veldstraat 35, Turnhout.
Secretaris : G. DEBROUWERE, Magdalenastraat 29, Kortrijk (tel. 1654).
Penningmeester : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Boekhandel (F. E. I.) : E. CORTVRIENDT, P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.
Examens : Dr. F. ROOSE, Guido Gezellelaan 15, Brugge.
Tentoonstellingsmateriaal : G. DE BOES, Wijnstraat 81, Ronse.
Voordrachten : A. ACKAERT, Gerardstraat 162, Brussel 4.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt om de maand. — Redactie : Fr. VAN DOOREN, Langstraat 40, Borgerhout. Kopij uiterlijk op 15^{en} van elke maand bij de redactie. — Administratie : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Postrekening nr. 2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel. — Barema der advertenties op aanvraag bij de administratie.

BIJDAGEN :


Leden-abonnten : fr. 25.— 's jaars; gewone bondsleden : fr. 5.— 's jaars.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :
FLANDRA LIGO ESPERANTISTA!

Flandra Esperanto-Instituto

VENDAS LA PLEJ
BELAIN INSIGNOJN !

JE PREZOJ
PLEJ MALALTAJ !



(La bildo montras la realan grandecon)

Modelo 1 ekzistas nur kun pinglo kaj speciale taŭgas por ornami kravaton; modeloj 2 kaj 3 ekzistas kun broĉo aŭ butono; modelo 4 ekzistas nur kun broĉo. Ĉiuj insignoj estas unuakvalitaj kaj fabrikitaj el orumita bronzo.

La sekcioj kaj reprezentantoj de **Flandra Ligo Esperantista** ĝuas 10 %-an rabaton kaj afrankitan sendon.

Aliaj klientoj aldonu 10 % por sendkostoj.

FLANDRA
ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Langstraat 40
Borgerhout ANTWERPEN

ADMINISTRACIO : Vlaamsche Stw. 70
BRUSSEL. P. C. K. : 2321.50 de FL. L. E.

La redakcio rezervas al si la rajton rituzi, korekti, mallongigi aŭ iel ajn ŝanĝi la ensenditajn kontribuajojn.

Jara kotiz-abono 25 fr.

APERAS MONATE

AL LA FIDELA MEMBRO :
FELICAN NOVJARON !

SUR LA SOJLO DE 1940.

Jaroj pasas, jaroj venas
Pluen urĝas la sentina temp'.

La memorinda jaro 1939 estas for. Ĝi restos en niaj memoroj kaj en la historio de la homaro kiel la elstara fata tempospaco en kiu la krucvojoj de du epokoj renkontiĝis. Estis jaro de vanaj esperoj kaj nervoskuaj okazintaĵoj. Ni ĉiuj sentis ke nia mondeto kun terura, neretenebla certeco ruliĝis al la abismo.

Fine de aŭgusto revenante de niaj ferioj, de niaj kongresoj ni vidis la minacan kuniĝon de l'pezaj nuboj kiuj baldaŭ plonĝigis ĉion en la plej nigran mallumon. Haltis la ordinara ĉiutaga vivo, fajfegis la alarm-sirenoj kaj de malproksime tonbris la sinistra bruo de l'kanonoj. Unu post la aliaj, landoj estis tirataj en la militan kataklismon...

Por ni Esperantistoj, estis jaro plena je malfacilaĵoj.

Kaj nun 1940 staras antaŭ ni. La nova jaro atendas nin kvazaŭ terura, nekonata inkubmonstro.

Amikoj, ni ne perdu esperon, ĉar post pluvo venos sunbrilo, post la vintro la printempo.

Amikoj ni ne perdu kuraĝon. Plifortigita per nova, decidema kaj konsci plena estraro, nia Ligo sukcesplene travivos la nunan, hodiaŭan malluman tempon.

Amikoj, ni ne perdu fidon. Ni donu la manon unu al la alia, kaj ŝultro kontraŭ ŝultro ni kuraĝe eniru la mallumon. Kune kaj komune ni ĵaluze defendu nian verdan stelon; ni konservu ĝin, ni flegu ĝin por ke, reveninte en la lumon, ni povu fiere ĝin montri, alte sur niaj etenditaj manoj, en la brilo de l'nova, venonta paco kriante :

Jen ESPERANTO, ni ankoraŭ havas ĝin !

Frans Van Dooren.



FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

Laŭstatuta kunveno en Antwerpen, la 17-12-1939.

Sendis delegiton : la sekcioj Antwerpen, Aalst, Brugge, Brussel, Breedene, Berchem, Denderleeuw, Gent, Kortrijk, Ronse, Turnhout. Sin senkulpigis : la sekcioj Harelbeke, Leuven, Oud-Turnhout.

S-ano Cortvriendt, vic-prezidanto, prezidas. Post la ĝojiga konstato ke malgraŭ la nenormalaj cirkonstancoj, la intereso de la sinceraj esperantistoj ne malgrandiĝis, li dankas la multajn ĉeestantojn el kiuj pluraj venas de sufiĉe malproksimaj lokoj.

La estraro respondas al diversaj urĝaj demandoj, inter alie pri la kosto de la kotiz-abono, kiu laŭkompare restas sub la mezo de tiuj de aliaj ligoj.

Post tiu enkonduko, s-ano Cortvriendt prezentas la dankon de la Ligo al la organizintoj de la Jubilea kongreso en Antwerpen, kie ĉiuj partoprenintoj guis vere memorindajn tagojn.

S-ano Baumers, nome de sekcio Turnhout, demandas noti en la raporton ke tiu sekcio faras rezervojn pri la parto de la financa raporto rilatanta al la elspezoj por la festaraĝoj.

Sekcio Turnhout riproĉas al la L. K. K. ke ĝi elspezis tro multe por ne-esperantistaj aranĝoj kaj rifuzis la kompletan repagon de la elspezoj faritaj de tiu sekcio por preparo de la teatraĵo.

S-ano Van Durme laŭtlegas leteron de 9-7-1938 per kiu Turnhout ofertis ludi senpage; poste leteron de 11-5-1939 indikantan sumon la kosto kies repago estis demandata.

S-ano Volders diras ke je ricevo de tiu letero, la L. K. K. miris ke « senpaga » ludado kostus pli ol 1.000 fr.

S-ano Cortvriendt opinias ke Turnhout sin ne sufiĉe klare esprimis kaj ke Antwerpen malatentis ke 3-akta ludado estas granda afero kiun oni ne devas subtaksi. Ĉiuj geaktoroj ludis senpage sed la aranĝo postulas kostojn. Sajnas ke tie kuŝis la miskompreno. Li proponas ke ambaŭ partioj serĉu inter si amikan solvon.

En la kongresaraĝoj la Ligo ne intervenis rekte; kvankam ĝi konsilis al la L. K. K. esti singarda, konsidere al la ĝenerala situacio. Tamen grandiozaj kaj belaj planoj estis ellaboritaj, la Antverpenanoj estis tre optimistaj, kio certe estis tre laŭdinda sed ne tre prudenta.

S-anoj Volders kaj Van Durme akcentas, ke konsiderante la antaŭan nombron da kongresanoj en Brugge, ili rajtis esperi je minimume 500 aliĝintoj kaj do povis prepari vere imponajn aranĝojn; ili ne akceptas la riproĉon ke la L. K. K. estis tro malŝparema.

Ankoraŭ intervenas s-anoj Baumers kaj Wouters por defendi la starpunkton de la sekcio Turnhout.

S-ano Van Dooren klarigas sian rolon kiel peranto inter la sekcioj Turnhout kaj Antwerpen kaj tre bedaŭras ke oni ne komprenis la utilon de teatra trupo, kiu devus fariĝi servo de la Ligo.

Por fini la diskuton, la kunveno akceptis ke la restantojn 400 francojn postulitaj de la sekcio Turnhout estu aldonataj al la kongres-

elspezoj, tiel la duono restos je ŝarĝo de la Ligo kaj la alia duono je ŝarĝo de sekcio Antwerpen.

Rilate la venontan kongreson, la kunveno aprobas la proponojn de la ligestraro. Fl. L. E. aranĝos kongreson, sed ne en amplekso kiel antaŭe. Principe ĝi okazos en Bruselo, je Pentekosto 1940. La kotizo estos 5 frankoj.

Pri la redaktoreco de « Flandra Esperantisto » : s-ano Cortvriendt komunikas ke la Ligestraro provizore konfidis tiun oficon al s-ano Frans Van Dooren el Borgerhout, pri kies kompetenteco oni jam povis juĝi. Apartenas al la kunveno sankcii tiun enoficiigon aŭ elekti alian personon. Ĉar ne sin prezentas aliaj kandidatoj, s-ano Van Dooren estas aklame kaj unuanime elektita por tiu grava posteno.

La nova redaktoro dankas la ĉeestantojn kaj deklaras ke la amplekso de la planoj por la estonteco dependas de la financa povo de la kaso kaj de la deziresprimoj de la legantoj.

La aldona « Flandra Studanto » devos malaperi en sia nuna formo, ĉar la prizorgantoj soldatiĝis; ĝi estos anstataŭata per dupaĝa lingva rubriko en la bulteno mem.

Pritraktante la laŭstatutan reelekton de la estraro, s-ano Cortvriendt bedaŭras la foriron de s-ano Rainson kiu tiom laboris por progresigi la Ligon, kaj esperas ke lia anstataŭanto montros la saman sindonemon.

Kiel kandidato estas prezentata s-ano Theo Van Gindertaelen el Antwerpen, advokato, prezidinto de nia Jubilea Kongreso. S-ano Cortvriendt prezentas lin kiel posedantan ĉiujn kvalitojn necesajn por nun-momente direkti la Esperanto-movadon en Flandrujo; li perfekte estras la lingvon, estas bona paroladisto kaj certe « uzos sian pledkapablon por nia afero ».

Por la funkcio de vic-prezidanto, s-ano Cortvriendt deklaras ke estante mobilizita, lia libera tempo estas ege limigita kaj ne plu permesas konvene daŭrigi tiun taskon : sekve, li petas ke oni ne plus reelektu lin. Ne temas pri retiriĝo el la aktiva movado, nur pri adaptiĝo al la cirkonstancoj. S-ano Cortvriendt deklaras sin preta laŭbezone kunlabori en malpli elstara posteno.

S-ro Baumers el Turnhout estas prezentata kiel kandidato por la vakanta funkcio; li konsentas akcepti, sed je kondiĉo ke la estraro laboru « pli laŭsisteme kaj plane ».

Por la posteno de kasisto, s-ano De Keyzer akceptas eventualan reelekton.

Al la balotado partoprenas la delegitoj de 11 sekcioj, disponantaj kune pri 213 voĉoj. Estis elektitaj :

Prezidanto :	S-ano VAN GINDERTALEN,	213 voĉoj.
Vic-prezidanto :	S-ano BAUMERS,	207 voĉoj.
Kasisto :	S-ano DE KEYZER,	213 voĉoj.

Ĉar s-ano Van Gindertaelen ne ĉeestas pro malsano, lia elekto estas farita sub rezervo de akcepto.

S-ano Cortvriendt gratulas la novajn funkciulojn kaj esprimas la esperon ke ili laboros kun antaŭ la okuloj la gvidprincipoj kiu estas en la statutoj.

F-ino Terryn plendas ke la membroj ne sufiĉe estas informitaj pri tio kio okazas en la Ligo kaj petas sciigojn rilate al la ekzamena komisiono.

80 JAROJ PASIS.

La 15-an de decembro 1859 okazis ke en modesta domo de Bielostok, negranda urbo en la oriento de Eŭropo, ekvidis la lumon de l'mondo unu knabeto, kies genio estis poste brilonta super ĉiuj kontinentoj kaj anguloj de la Tero.

Antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ alvenis al la naskiĝurbo de D-ro L. L. Zamenhof homoj el multaj landoj, por honori lin, por viziti la lokojn kie paŝis liaj piedoj, kaj la domon kie li pasigis siajn infanjarojn. Ne atentis la vizitantoj pri la malglata pavimo, pri la polvo aŭ koto de la stratoj, nek pri la malriĉeco kaj mizereco de la pli multaj domoj en tiu ĉi urbo : estis tamen la urbo kiu donacis al ni nian majstron !

Kiam Zamenhof naskiĝis, Bielestok apartenis al la granda rusa regno carista. Post la mondmilito ĝi fariĝis pola, kaj ni konis ĝin prefere sub la nomo Bielostok. Nun denove ĝin prenis Rusujo.

Tiel ŝanĝiĝas la sorto kaj la estroj.

Kaj la domo de la majstro estas detruita. Ne pro malbonvolo. Ho ne! Oni ĝin forigis, por ĝialoke konstrui pli modernan domon. Ĝi estis ja nur ligna, kaj kaduka. Kaj por ĝiaj posedantoj ĝi ne havis tian apartan valoron, kian ĝi prezentis por ni, adeptoj de la majstro, adeptoj de la ideo de lingvo internacia, — valoron pli altan ol nur materia.

Feliĉaj ili, kiuj povis ankoraŭ ĉeesti en Bielostok, viziti la ankoraŭ nedetruiitan domon de la majstro, kaj vid-al-vide kun ĝi revoki al sia imago la tagojn de l'juna Zamenhof, liajn dolorojn kaj liajn revojn, el kiuj fine rezultis tiu grandioza verko kiu jam ampleksas la mondon!

Kaj, kvankam lia domo ruiniĝis, lia naskiĝurbo foje kaj denove ŝanĝis sian posedanton, ankaŭ lin mem jam delonge kovras la tero, kaj liaj parencoj eble vagas ie en mizero, eble ien rifuĝis, de kie ili ankoraŭ ne povis sendi informojn al la esperantistaro, — lia verko vivas, kaj vivados.

Ĝin nenio, kaj neniu, povos detrui, kaj nenio kaj neniu povos malhelpi ĝian venkon.

Kaj la 15-a de decembro 1859 restos por ĉiam enskribita en la kultura historio de la homaro, kiel tago granda, memorinda, multsignifa, en kiu naskiĝis unu el la homoj la plej geniaj, la plej bonaj, la plej valoraj : **Ludoviko Lazaro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto!**

El « Heroldo ».

(Daŭrigo de p. 3)

S-ano Cortvriendt respondas ke estis certgrade persona labora de s-ano Rainson. Al tiu komisiono ĝis nun aliĝis la Federacio de Laboristaj Esperantistoj F. U. K. E. kaj Flandra Ligo Esperantista. Niaj delegitoj en ĝi estas : s-anoj Rainson, Van Gindertaelen kaj Roose.

S-ano Roose komunikas ke la komisiono estas preta eklabori kaj nur atendas la enskribojn de la ekzamenontoj. Ministerian sankciigon de la diplomoj oni petos nur post atingo de rezultatoj.

La kunsido komisias s-anon Roose esti la peranto inter la Ligo kaj la Komisiono.

La estraro respondas ankoraŭ al diversaj demandoj kaj fermas la kunsidon je la 13.30 horo.

La Sekretario.

DANCANTA PEĈJO.

Lia korpo tute tremetis pro la artrito; kiam li devis preni ion similis al hezita palpado de ŝtelintenca mano en la mallumo. Paŝante liaj kruroj balanciĝis kiel de ebrulo, tial ĉiuj nomis lin « dancanta Peĉjo ».

Tamen ne pensu ke li restis en brakseĝo! Peĉjo, kiu ĝis sia sesdek-kvina jaro estis paketportisto ĉe la stacidomo, sed kiu nun ricevis la maljunul-pension, ja havis... multan « laboron ». Sed ne tro laŭte diru tion; se ne li ne plu ricevus la ŝtatan almozon. Ordinare dum kvar mate-noj el la semajno li iris al la publikaj vendadoj, kie li ĵaluze konkurencis kontraŭ sortkolegoj por hejmenporti ĉiuspecajn objektojn de la aĉe-tintoj. Sed lia ĉefa komerco, ĉar li ankaŭ komercis, estis la akirado de malnovaj, kadukaj, senfundaj ŝrankoj, kestoj, seĝoj kun du aŭ tri piedoj difektitaj tabloj kaj ĉiuj eblaj lignaĵoj, meblaĉoj, hareng- kaj oranĝo-kestoj.

Per luita puŝveturilo Dancanta Peĉjo transportis sian trezoron, kaj en la kaduka strateto, kie li loĝis, la pasado de tiu mallonga procesio dirigis pli ol unu malbenon.

Liaj najbaroj ja sciis kion signifis tia triumfa alveno.

Dum la sekvantaj semajnoj neniu en la ĉirkaŭaĵo plu bezonis vekhorloĝon.

Precize je la kvina matene aŭdiĝis : « Tok... tok... tok... ». Regula frapado de hakilo, krakado de ligno, rompada murmuro. Tok... tok... tok... Nur Alekso, kiu loĝis tri domojn flanke de Peĉjo, kaj kiu jam je la sesa devis esti en la stacidomo por vojaĝi al la najbara grandurbo estis dankema por la vekado.

La hakitan lignon li poste segis en egallongajn pecojn kaj kunligis en faskojn. Lia famo kiel vendisto de malmultekosta brulligno estis nediskutebla.

La dometo de Dancanta Peĉjo konsistis el du ejoj kiujn ordinaro oni nomas : kuirejo kaj dormoĉambro. La unua ejo, kie li ankaŭ kuiris, estis kompreneble samtempe laborejo kaj magazeno. Nur tri kadukaj seĝoj, neniam malplena tablo, prahistoria ŝranko, rusta forno... kaj nesto por Fifo, la ruĝetkolora katino, kies senpatra familio konstante kreskis. Sed mi preskaŭ forgesis paroli pri Fifo, kvankam la alveno de la kato estis la komenciĝo de nova epoko en la mizera vivo de nia heroo.

Antaŭ sep jaroj, tiam Peĉjo estis sedek-unujara, mortis lia edzino, kaj lasis lin sola. Ni ne pritraktos la vivon de tiu virino, kiu... sed la mortintoj ni lasu dormi pace...

Dum la sama jaro ankaŭ la virkato Pan mortis pro maljuneco, kaj virino el la ĉirkaŭaĵo oferis al li novan katidon, kiun Peĉjo danke akceptis. La virino, Marta estis ŝia nomo, kompatis la malriĉan, solecan viron. Ŝi estis tre pia, kaj konvinkita ke por gajni la ĉielon, necesas multe bonfari. Kiel do pli bone bonfari, ol alportante konsolon kaj malgrandajn almozojn al mizerulo kia Dancanta Peĉjo ?

Depost la donaco de Fifo, Marta de temp' al tempo revenis al la malpura, malriĉega dometo de nia heroo. Certe ne ĉiam sen iu sento de naŭzo si vizitis lin, sed ju pli malplaĉis al ŝi, despli granda estos la ĉiela profito.

Sed al Peĉjo pli kaj pli plaĉis... Kaj... kaj... kaj... kiu scias?... Li alridis sin mem en la de muŝoj malpurigita spegulaĉo, kaj en la malgrasa, vizaĝo, denove brilis la okuloj...

Siaflanke Marta estis tre atabla. Ŝi jam pli al kutimiĝis al la mizera atmosfero. Por plibonigi la ĝeneralan staton de l' dometo okazis ke ŝi mem purigis ĝin. Ŝi riparigis la ŝiritajn vestaĵojn kaj tolaĵojn; en unu vorto : bonkora Marta iĝis la bona anĝelo por nia mizerulo, ŝi tre ĝojis pro la afableco, kiun li danke montris. Jes, jes, Peĉjo estis kontenta pro ŝia alveno, tion ŝi certe rimarkis, tamen neniam pensis ke povas esti io alia, io pli ol amikeco. Marta, kiu neniam konis la amon dum ŝia vivo, eĉ ne povis supozi ke Amoro ludis iun rolon.

La najbaroj, kiuj inter si pli ol unu foje jam ŝerĉe ridis pri la « amatino de Dancanta Peĉjo », komencis klaĉi. Kaj Marta aŭdis pri tio...

Ŝi tre ĉagrenis, sed malgraŭ tio, ŝi silente daŭrigis la filantropan agadon por gajni sian ĉielon.

Sed ankoraŭ alia malfeliĉo minacis Dancantan Peĉjon.

Antaŭ tri jaroj jam, lia dometo estis aĉetita de sinjoro Delpont, kiu ĝin bezonis.

Sinjoro Delpont jam diverŝfoje invitis Peĉjon transloĝi, por iri al la maljunulejo, kie li certe vivus malpli mizere, pli sane, pli konforte. Sed tiam oni parolis pri tio, estis kvazaŭ Peĉjo ekvidis la diablon.

Iun matenon sinjoro Delpont kun takto anoncis al Dancanta Peĉjo ke la domaĉo nepre devos malaperi, li mem aranĝos la akceptadon en la urban maljunulejo. Sed nova esplodo de treneza kolero sin desegnis sur la vizaĝon de la malriĉulo.

Du tagojn poste sin prezentis policano kaj per mildaj vortoj li oficiale anoncis ke laŭleĝe ne plu estis eble resti tie ĉi.

Marta, kiu ĵus post la foriro de l' oficialulo alportis lin iom da sukero por lia kafo, trovis lin ploranta.

— Marta! Marta! li ĝemis, se mi devas iri al la maljunulejo, vi ne plu povos viziti min; mi devos vivi inter tiuj, klaĉantaj homoj, kiujn mi malamas... inter tiuj grizaj muroj...

Kaj tiam, petante kaj hontante kiel infano, kiu post hezito diras ion malbonan.

— Ĉu mi ne povos vivi ĉe vi... en via subtegmenta, cambro... estos sufiĉe granda por mi...

Marta ruĝiĝis.

— Kion vi do demandas, Peĉjo? Ho, tio ne estas ebla... Ĉu vi ne komprenas tion?...

— Mi estas tiel malfeliĉa...

— Kion dirus la homoj... kaj Dio... kaj...

— Ni geedziĝos...

Kompate la virino alrigardis tiun viron, kiu, kvazaŭ dancis apud la tombobordo.

— Ho, Peĉjo, ŝi amike diris. Ni ja estas tro maljunaj por tio... Nu, nu, estu trankvila, en la maljunulejo ne estas tiel malbona. Kaj mi certe trovos okazon renkonti vin kaj resti vian « bonan anĝelon »!

Sed Peĉjo leviĝis el sia seĝo... Liaj malhelaj okuloj flamis...

— Do, ankaŭ vi min kondamnas, kaj li blasfemis...

Timege Marta malantaŭeniris al la pordo.

— Trankviliĝu, Peĉjo, ŝi balbutis.

— Ĉe Diablo! For! Ankaŭ vi, li kriegis kolere. Marta forrituĝis surstraten... kaj aŭdis ankoraŭ kiel li bruege forjetis la paketon da sukero kontraŭ la muron.

* * *

KANTO POR SI.

Poemo de Asen Zlatarov.

Dediĉita al S-ino Yvonne B. S.

Kiom multe da lekantoj ornamis la verdan tapiŝon de la sukplenaj herbejoj!

Mi kolektis kaj plektis kronojn de kampaj floroj, kaj meze de la ekstazo de mia ebrigo, mi etendis manon kvazaŭ mi volis kroni iun...

Poste mi ekreviĝis : kvazaŭ fajrero rampis tremo sur min kaj dum momento min tenis en stranga ekscito. Sed dezirego kaj ĝojo min superverŝis, kaj mi malfermis manojn kaj freneze kuris sur la herbejo, certa, ke la morgaŭa tago estos pli bela ol la hodiaŭa.

Mi komprenis klare, ke mi ne estas la antaŭa : nura penso estis fariĝinta pli legebla, la sento pli subtila, kaj mi pripensis kaj kaptis aterojn, kiuj pli frue estis fremdaj kaj malproksimaj por mi, aŭ kiuj elglitis el mia animo. Mi ĉesis ami la naturon, kaj la urbo min ravis : tie mi trovis lognutraĵon por soifanta animo kaj mi klare vidis, kiel kontraŭ la simplaj ĝojoj de la kampoj, arbaroj kaj valoj, en la urbo dormetas aliaj ĝuoj kaj aliaj ĝojoj.

La urbo ekstaris kiel vivanto kaj min kaptis. Ĝi kaptis min por ĉiam.

Ĝi kaŝis misterojn kiajn la naturo ne havas : ĝi min logis per ĉarmoj, nekonataj de mi : ĝi min timigis kaj flatis en la sama tempo, kaj mi fordonis min al ĝi.

En la urbo loĝis La Virino, kaj mi ekrigardis alarme kaj konfuze al ŝi.

Io nova naskiĝis en mia koro kaj min ŝanĝis, mi serĉis en la Virino forgesitajn trajtojn, mi serĉis la reviviĝon de malproksima, velkinta memoro, mi atendis de ŝi donacojn kiujn iam malklare mi estis revinta kaj sentinta...

* * *

Iun tagon mi renkontis Cin. Kaj mi rekonis Cin. Ci estas la Feino, kiu ekstaris dum momento antaŭ mi, kiam mi estis ankoraŭ infano, kaj kiu lasis profunde en mia animo la postsignojn de unua vekigo.

Mi vidis Cin : Ciaj okloj estis blujaj, kaj du plektaĵoj de oraj haroj ornamis Cian frunton.

Ci estis hontema kaj delikata.

Mi ne kuraĝis demandi pri Cia nomo, mi ne kuraĝis eĉ la okulojn levi, kiam mi renkontis Cin, kaj per haltigita spiro mi iris forlogita, mi ornamis Cin per floroj en mia koro kaj revis fariĝi heroo, fari heroaĵojn por Ci, por ke estu mia amo, inda por Cia ĉarmo.

El la bulgara tradukis por Fl. E.

I. H. Krestanov, L. K.

La sekvontan matenon la fenestroj restis fermitaj. Neniu atentis.

Sed kiam posttagmeze, Marta alpuŝata per ia antaŭsento, alvenis en la strateto, kaj la genajbaroj al ŝi anoncis la situacion, ŝi terure paliĝis... « Mi timas, ŝi balbutis, mi timas... ».

— Ni avertu la policon, iu proponis.

Oni faris tion...

«Kaj ĉe la fermilo de pordo pendis la mortinta Peĉjo... Kaj Fifo, la katino sidis apud la senviva mastro kaj plende miaŭis...»

Pol Van der Poel.



Por ĉio koncernanta ĉi-tiun rubrikon skribu rekte al la prizorganto : S-ro Coppé, Hovenierstraat 63, Ledeborg apud Gent.

FLANDRAJ STUDANT(IN)OJ.

Certaj cirkonstancoj devigis nin akcepti kelkajn decidojn, kiuj ne ĉiam estas konformaj al niaj deziroj. Tial ke « Flandra Studanto » ankaŭ viktimiĝis, ĝi estontece aperos tiel, kiel nun, do dupage.

Manko da loko devigas nin esti koncizaj, tial ni petas la estimatan studentaron ke ili akceptu ĉi tiujn kelkajn vortojn kiel informon avertan. Ni esperas ke same kiel pasintjare la legantoj ankaŭ dum la nuna jaro kunhelpos per la ensendo de demandoj diversaj, kritikoj, sugestioj, ktp.

La « Redakcio » mem klopodos kiom eble plenumi la deziron de la legantoj kaj ĝia nura deziro estas ke kune kun pli bonaj tempoj ĝi povos anonci la reaperadan de nia studorgano en tia formo, kia ĝi aperis dum nia unua eldonjaro.


GESCHIEDENIS VAN ESPERANTO (vervolg).

5 Augustus 1905 is dus een groote dag geweest voor Esperanto. Dit eerste kongres te Boulogne is een openbare bevestiging geweest van de leefbaarheid van Zamenhof's taal, een mijlpaal in de geschiedenis van de internationale taal in het algemeen. Zamenhof bracht er een innige en hoogstaande hulde aan de nagedachtenis van groote pioniers, o. w. hij vooral den zeer eerwaarden Johann Martin Schleyer, samensteller van Volapük, vernoemde. Maar dit kongres is tevens geweest het vertrekpunt voor een dieper, doordringende beweging, een beweging die nu gansch de wereld in haar idealistische streving omvat. In Frankrijk werkte vooral de « Société pour la propagantion de l'Esperanto », ondersteund door een heele rij vooraanstaande personaliteiten uit wetenschappelijke en universitaire kringen. Boeken en artikelen verschenen in en over de taal, vreemde werken werden vertaald, cursussen ingericht, stappen gedaan om de taal officieel te doen erkennen, in een woord de taal « Esperanto » leefde en bloeide op in een steeds ruimer wordende werking. Ook in andere landen nam Esperanto vlug een groote uitbreiding, vooral in Duitschland, Oostenrijk en de Scandinavische landen. Het zal voor een andere reeks artikels zijn de meer gedetailleerde geschiedenis van Esperanto in de verschillende landen van de wereld te belichten; voorloopig houden we ons aan een algemeen overzicht van de groote stroomingen. Naast de voornaamste landen leerden ook kleinere gebieden Zamenhof's welluidende taal kennen, en overal verzezen nieuwe vereenigingen, die de cellen vormen van de geheele Esperanto-beweging. Van die cellen uit werd het goede woord verkondigd en propageerden ijvrige medewerkers hun ideaal in eigen kring, buitenstaande vereenigingen van allerlei aard en natuur namen Esperanto aan als internationale hulptaal, en gebruikten het in hun internationale betrekkingen; zoo bestonden er in 1907 in Europa alleen reeds meer dan 1200 groepen en een 20-tal nationale maatschappijen. De jaarlijksche kongressen brachten menschen van alle nationaliteiten bijeen, en in die dagen van internationale verstandhouding, op kleine schaal werd er vredelevend gedacht, gesproken, gezongen en gepraat in Esperanto. Grootsche bijeenkomsten, die over enkele eeuwen tot de positieve geschiedenis zullen gerekend worden.

KOREKTITAJ EKZERCOJ.

Oef. 1. — A) Wordvorming met mal, ist en volledige vertaling. — Malamo = haat — negocisto = handelaar — malfermi = openen — malsata = hongerig — portisto = drager, kruier — dentisto = tandarts — razisto = barbier — malbona = slecht — forĝisto = smid — malbela = leelijk — ĉasisto = jager — gardisto = waker — malamiko = vijand — malfeliĉa = ongelukkig — telegrafisto = telegraphist.

FLANDRA ESPERANTISTO



FLE

MONATA REVUO
DE LA FLANDRA
LIGO ESPERANTISTA

OFFICIEEL
ORGAAN
VAN DE

VLAAMSCHE
ESPERANTO
BEWEGING

FLANDRA ESPERANTISTO

ENHAVO DE LA JARKOLEKTO 1938-1939.

RIMARKO : Numeroj grasaj (21) estas de la 10a jarkolekto.
Numeroj ordinaraj (21) estas de la 11a jarkolekto.

PROZAJOJ.

BREUGELMANS, Frans. — La morto de Panjo	41
DORNO, F. V. — Printempa Mateniĝo	85
— » — Esperantistojn kiujn mi malŝatas	186
FRANZMAN, Carl. — Kiam voĉo bildiĝas	170
JUNG, Teo. — La kernproblemo*	148
KEN, Teo. — Hemisfero en Hararo (Ch. Baudelaire)	151
— » — Ebrriĝu vin	183
KRISTANOV, Ivan H. — La miraklo de la dudeka jarcento*	132
LODEMA, A. — Mia adreso	182
WIERINCKX, Edmond. — Bruĝo la bela	37
TOP, M. J. — Ora paĝo el mia libertempo (Svislando)	53
VAN DER POEL, Pol. — La vivo estas danco	21
— » — Kion monero rakontis	83
— » — Ĝasbando	116
— » — La vojoj misteraj de Amoro	134
— » — Kiel la Amo venkis la Morton*	164
(Preseraro : Legu la 2an ĝis la 25an liniojn de paĝo 166 post la 24a linio de paĝo 165)	

POEMOJ.

DORNO, F. V. — La mortanta soldato	57
— » — Vi	71
— » — Lulkanto	105
— » — Kongresurboj : Bruĝo, Antverpeno	61
— » — Kongresa amo	72
VERMUYTEN, Hector. — Het lied van den zwerver (K. Kalocsay)	58
— » — Gebed*	178
KARNAS, Juul. — Skizo	38
TYNEVERUM. — Sonetoj (Urbain van de Voorde)	139
— » — La rido	160
— » — Nur serĉo	176
VAN DER POEL, Pol. — Surprizo	38
— » — Miaj revoj (Annie Salomons)	72
— » — Miaj pensoj (Annie Salomons)	72
— » — Iluzioj	86
— » — Se povus mi	105
— » — Sapiroj	117

ESPERANTO MOVADO.

1. — Tutmonda.

ABIO. — Ni preparu nin al nova mondo	188
BAAS, P. W. — Oficejo Esperanto ĉe la instruado	68
BROODCOORENS, G. — Pledo por firma organizo	102
— » — Redaktora komuniko	108
BUENTING, F. W. — Esperanto kiel fenomeno de la vivo*	180
DEGENKAMP, G. T. — La pura lingva evoluo	65, 93
F. R. — Pri interna ideo de Esperanto	56
H. R. — Esperanto kaj la junularo	26, 40, 138
J. I. M. — Ĉu oni povas efike propagandi Esperanton per kino ?	59
LIENHARDT, Albert. — Resumoj en Esperanto	70
LODEMA, A. — Nigra paĝo en mia kongreslibro	35
— » — La 1000a numero de « Heroldo »	24
— » — Postkongresa aventuro	154
VAN DOOREN, Frans. — Kien Esperanto ?	161
SENNOMA. — Dua internacia junularkunveno	94
— » — Esperanto egala al naciaj lingvoj ?	65
— » — Esperantista interhelpo	58
— » — Esperantista lingva komitato	73, 91, 43
— » — La domo de Zamenhof	122
— » — Komuniko de la lingva komitato	122
— » — Ne perdu la kuraĝon (Sennaciulo)	17
— » — Nova perdo	122
— » — Universala kongreso Bern	26

2. — Flandra.

BREMISO. — Vejoj de fidela esperantisto	22
DONOMT, Mone. — Utiligu Esperanton per korespondado	33
— » — Kvanto aŭ kvalito ?	123
E. C. — Interesa statistiko (raportoj pri kongreso)	111
KRESTANOV, Ivan. — Dankvorteto de bulgara samideano	55
LODEMA, A. — La gaja-kongreso lundo	57
VAN DER POEL, Pol. — La dekjara « Flandra Esperantisto »	81
VAN DOOREN, Frans. — Ni estu bonaj esperantistoj	113
— » — Al nova taskaro	129
— » — Milito	145
VAN DURME, H. — Kongresraporto*	98
VAN GINDERTALEN, Theo. — E. K. I.	103
SENNOMA. — 10a Jubilea kongreso de Fl. E.	81, 101, 17, 38, 51, 71, 90, 108
— » — Flandrema Grupo Esperantista	41
— » — Flandra ligo esperantista (ligkunvenoj ktp.)	2, 51, 97, 49, 73
— » — Flandra Esperanto-Instituto	101
— » — Inter ni, 13, 27, 43, 61, 77, 93, 108, 28, 45, 61, 76, 95, 110, 126, 142, 158, 173, 190.	
— » — Komunikoj de la estraro, 10, 19, 36, 53, 67, 83, 100, 20, 37, 69, 83, 105, 115, 131, 147, 163, 178.	
— » — 9a Kongreso de Fl. L. E.	1-8

ENGHOLM, Stella. — 187.000 da kronoj	149
E. C. — Hendrik Conscience	34
ECO. — La flandraj naciaj kantfestoj	12
E. V. — Antverpeno, la urbo de nia Xa*	106
G. B. — La eterna lingvo-babelo	91
JEVA. — Sur scienca kampo	104
KAR-AM-BOL-O. — Hipikritoj	167
SOLC, Karlo. — Letero el Bohemujo	133
VAN DURME, H. — Irlanda Lingvo en Ameriko	69
SENNOMA. — Angulo de la serĉemulo, 15, 31, 47, 63, 70, 95, 110, 30, 47, 63, 79, 111, 127, 143, 159, 175, 192.	
— » — Bibliografio, 22, 45, 75, 89, 58, 79, 86, 107, 124, 140, 157, 172	
— » — Diest sin preparas por grandag festoj	26
— » — Diversaĵoj (literatura mondo)	40
— » — Nekrologo	42
— » — Ni prezentas al niaj legantoj	132, 148, 164
— » — Por nia flago	29, 43, 40
— » — Radio-rubriko	107, 60
— » — Redakcia leterkesto	51, 75, 131, 174
— » — Tra la Esperanto gazetaro	27, 125, 141, 156, 173, 189

Nederlandaj artikoloj.

BROODCOORENS, G. — Wordt Esperanto de taal van den film ?	66
CORTVRIENDT, E. — Waarom Esperanto ?	49
— » — Esperanto-leven in Vlaanderen	87
— » — Het oprichten van een Esperanto examencommissie*	119
T. V. G. — Na de kongresdrukte	153
VAN DER POEL, Pol. — Ons practisch humanisme	52
NAAMLOOS. — Esperanto in de practijk, 18, 50, 19, 55, 70, 84, 120, 136, 152, 168, 184.	
— » — Esperanto-wetenswaardigheden	21
— » — Groote Esperanto-tentoonstelling	103
— » — Over bedankjes	185
FLANDRA STUDANTO aperis en numeroj 114 ĝis 126.	

La artikoloj markitaj per steleto (*) estas ilustritaj.



B) La ĉielo estas lazura, blua — sango ruĝa — oranĝo flava — herbo verda — karbo nigra — haroj brunaj, blondaj, grizaj etc. — biero blonda, bruna, nigra — figro falsa — leono brava, dangera, sovaĝo etc. — telero = plata, ronda, blanka, etc.

C) Lernolibro estas libro per kiu oni lernas — Skribotablo estas tablo sur kiu oni skribas — Sparkaso estas kaso en kiu oni ŝparas — Dancario estas ario laŭ kiu oni dancas — Trinkglaso estas glaso el kiu oni trinkas — Jetŝtono estas ŝtono kiun oni jetas — Ludkartoj estas kartoĵoj per kiuj oni ludas — Dormrobo estas robo per kiu oni dormas — Cashundo estas hundo per kiu oni ĉasas — Insultkrio estas krio per kiu oni insultas — Petskribo estas skribo per kiu oni petas.

Oef. 2. — A) Vertaal in Esperanto :

1. Mi vidas vin — 2. Vi ne konas min — 3. Ĉu ni deziras panon? — Ĉu vi preferas supon? — 4. La patrino lavas la malpurajn infanojn — 5. La du partoj de la tago nomigas : la tago kaj la nokto — 6. La eksinstruisto estas malsana. — 7. Judito estas malbona virino — 8. Lia onklo estas malsana — 9. Jen estas mia libro — 10. Mi konas vian bopatron — 11. Ĉu ĉiu laboras — 12. Iu frapas la pordon — Ili vizitis kvinope la teatron kaj revenis sesope — 13. Mi vidas nenium en la ĉambro — 14. Li faras la duonon de sia hejmotasko — 15. La lernantoj promenas po du — 17. Kostas po unu franko — 18. Tio estas tre malkara, ĉu ne? — 19. La infano tranĉus al si kaj vundus sin, se ĝia patrino sin ne okupus pri ĝi. — 20. Li lavas sin en sia ĉambro. — 21. La knabino sin preparis, por sia ekzameno — 22. La kurso komenciĝos la 1an de oktobro — 23. La ŝnuro estas dek metrojn longa — 24. La flugmaŝino flugis supren kaj restis tri horojn supre — 25. Muŝo flugis en la glason kaj naĝis en la biero.

Oef. B). 1. Mi foje invitos ŝin al lunĉo, tiam ne tuj ĉion scios — 2. Kio okazas malantaŭ la kulisoj ni ne scias kaj la tuta cetero estas komedio — 3. Ĉie estas aranĝata kurso por pasiva defendo kontraŭ aeratakoj — 4. Li estas netolerebla viro kiu kredas sin la personigita saĝeco — 5. Mizero plej ekstrema, Dio plej proksima — 6. Atentu pri viaj vortoj, kara, tiaj vortoj ne konvenas — 7. De post kiam mi skribis al vi el Hago, vi ne jam ricevis novaĵojn de mi — 8. Forironte, li prenis sian pluvombrelon — 9. Mi vidis, ke li eniras la domon — 10. Li demandis al mi, ĉu vi volas prunti al ni 10 guldenojn — 11. Ni gajnas pro 8 frankojn — 12. Mi ne scias la kialon de lia foriro — 13. Mia fratino igas mian ĉambron pura — 14. Oni evitas lin pro lia fiero — 15. Si parolis al mia patrino — 16. Antaŭ mia domo okazis terura akcidento — 17. Por atingi nian idealon ni devas streĉi niajn fortojn — 18. La nova eldono estos presita antaŭ la 2a de tiu ĉi monato — 19. Per Esperanto ĉiuj homoj komprenas unu la alian — 20. Tiu Hungaro parolas nian lingvon terure malbone — 21. Li ame rigardis ŝin — 22. Silenta interkonsento — 23. La parolanto entuziasmigus siajn aŭskultantojn.

Oef. 3. — Por niaj pragevoj vojaĝi de Amsterdamo al Harlemono estis grava entrepreno. Ili vojaĝis per ŝipo tirata de ĉevaloj aŭ per poŝtveturilo. Malnovaj bildoj kaj pentraĵoj ankoraŭ nun rakontas pri tiuj vojaĝiloj. Ni rigardu tian bildon. La ŝipestro fumante sian pipon, trankvile sidas ĉe la direktilo, Sinjoro, kiu surhavas altan ĉapelon intime parolas kun gracie vestita sinjorino. Sur la vojo laŭlonge de la kanalo, la ĉevalo kondukata de servisto tiras per longa ŝnuro la ŝipon. Aliaj bildoj vidigas al ni poŝtveturilon. Du aŭ pli da trotantaj ĉevaloj movigas la pezan veturilon. Apud la veturigisto sidas la kondukto, kiu blovas la kornon por anonci la alvenon de la veturilo. Post la fenestro de la kaleŝo ni vidas la vizaĝon de kelkaj pasaĝeroj, kofroj kaj aliaj pakajoj kuŝas sur la tegmento. Granda estas la diferenco inter la tiama vojaĝmaniero kaj la nuna. Kio antaŭe estis grava entrepreno estas nun bagatelajo. En malmulte da tempo vagonaroj kaj aŭtomobiloj transportas nin kaj niajn havaĵojn. Vojaĝo, kiu antaŭ cent jaroj daŭris preskaŭ tutan tagon, nuntempe estas plenumata en malpli ol unu horo. Tirataj ŝipoj kaj poŝtkaleŝo malaperis kaj jam la vaporvagonaro iom post iom estas anstataŭata de pli rapidaj elektraj vagonaroj. Eble post unu jarcento oni montros bildojn, kiuj prezentas niajn vagonarojn kiel historiaĵojn kaj la plenaĝuloj rakontos al la infanoj : tiel niaj gevoj vojaĝis.

MALNOVAJ NUMEROJ kaj JARKLEKTOJ de FL. E. estas haveblaj ĉe :
FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO



Pri la artikoloj respondecas nur la verkintoj. La verkintoj povas uzi pseŭdonimon, sed ili devas konatigi sian nomon al la redakcio. Artikoloj estu kiel eble plej koncizaj.

ĈU INTERESAS VIN ?

La vivo estas batalo — estis batalo kaj estos batalo — sed pro tio ne necesas bestigi en mortiga milito. Oni devas batali per « logiko ». Plurfoje oni citas la bonvolon de patrinoj, ĉar ili estas la unuaj kiuj konatiĝas kun la junularo, ĉar ili posedas la rimedojn, en la infanon penetrigi ideojn kiujn por ili dum posta aĝo povas esti utilaj. Sed kion diri pri la patrinoj kiuj sekvas la sistemon : « ni ne cerbumu »; de la patrinoj kiuj ne konscias al kiu klaso ili apartenas : homo aŭ besto. Nur kiam post milito iliaj infanoj revenas, ĉu kripligitaj, lamaj aŭ blindaj — se ili ne lasis siajn junajn vivojn en la hombuĉado — tiam ili estas la unuaj por montri kompaton, kaj malbeni la militon. Sed, ho ve, tiam estas tro malfrue! Pro tio ne estas sen intereso kaj precipe por patrinoj kiuj ne ankoraŭ scias, ke oni konvinku ilin kiel necesa estas eduki siajn infanojn por ke ili antaŭ ol oni pelas ilin al la buĉejo, per propra opinio sciu « pro kiu » kaj « pro kio », kaj ne plu oferos sin por entrepreno kiu je l'fino ne estas la sia !!

Ili konsciu pri la ideo ke : « malebligi ion estas pli bona ol kuraci »; ili kiuj portis en si la vivon; ili kiuj travivis la naskiĝdolorojn; ili kiuj dum noktoj kuŝis sen ekdormi kiam la etuloj malsanas; ili kiuj oferus ĉion por ke iliaj karuletoj ne estus forprenataj de la morto !!!

Estas bela, tiel diras iuj, morti por la patrujo, sed... estas multe pli bela vivadi por la patrujo ĉar vivata oni almenaŭ povas fari ion por tiu patrujo.

Instruu al viaj infanoj la internacian helplingvon : **Esperanto**, per kiu ili pli poste sin povos movadi tra la tuta mondo kiel « homo »; la mondo kiu estas por ĉiu kaj ne por kelkaj, la mondo kiu estas kreita **sen limoj !...**

Homo kiam vi homiĝos!!!

Jeva.

NIGRAJ TAGOJ.

La tagoj, la semajnoj, la monatoj, la jaroj forkuregis sed la gravaj memorajoj restas premitaj en nia kapo. Pli ol 20 jaroj jam ni plimaljuniĝis sed la postmilitaj okazintaĵoj impresas nin ankoraŭ nun.

1919. For la murdado, for la milito, for la malsato, for la mizero ! Neniam plu militon! Ni rekomencu novan vivon! Priploru ankoraŭ viajn mortintojn sed ili restu herooj, ĉar ili donis siajn freŝajn junajn vivojn por restarigi novan societon, plibeligi la mondon kaj nuligi la maljustecon. Ĉiu al la laboro kaj laboro por ĉiu! La nigrajn tagojn ni ne plu revidos !...

1929. Post dek jaroj da penado, ni rikoltis la fruktojn de nia laboro, kaj ni ĝuis la superfluon. Li vivo estis bela, la suno leviĝis sur ĉiun; neniu

nubeto kovris la horizonton. Ho! La mondo fine retrovis la trankvilecon. Ekregis Espero, Interfratiĝo, Internaciismo...

Sed ni nur songis! Estis nur preterpasanta fimero! La abundokorno estis malplenigita. Ĉu la tempo formangiĝis nian provizion? Kaj niaj formetitaj fruktoj ne plu same valoras. Ĉu iu forprenis parton? Tamen ŝtelisto ne kaptis ilin, ĉar ni ĉiam vigle kontrolis nian proprajn. Ni posedis ankoraŭ la kvanton sed ne plus la kvaliton. Eta malheleco montriĝis ĉe la horizonto.

La kruela realo baldaŭ firme sin altrudis. Ĉe denove la senlaboreco minacis la fortajn brakojn. Ni volis labori, ni volis vivi. Ni estis junaj, ni estis sanaj, ni estis fortaj, kial ni ne plu povis plugi la teron kial ni ne plu povis produkti?

Malfidela homaro, vi al ni promesis prosperon kaj feliĉon post la mondmilito. Ni kredis en vi sed vi trompis nin. Ĉu ni mem kulpis pri tio? Diru al ni la veron! Nigraj tagoj denove alluis.

La idealoj ne plu estis tolerataj, tamen sur tiuj idealoj estis bazitaj la fundamentoj de nia surtera paradizo. Malpermeso eĉ puno frapis la idealistojn. La interfratiĝo pere de universalajoj estis malpermesataj. Libereco, egaleco kaj frateco, la batalvortoj de internaciuloj estis enterigataj de novaj nur nacie pensantaj kaj agantaj diktatoroj.

Esperanto estis kondamnita en diversaj landoj kiel « nedezirata fremdajo », kaj la Esperantistaj ĝenataj, persekutataj, kaj eĉ punataj. Interfratiĝo iĝis « krimo ».

1939. Nova bato! La nigraj tagoj plidensiĝis super nia kapo. Ne estis ĉio. Denove milito ekbrulas en ĉiuj mondpartoj. Denove oni detruadas artaĵojn, denove oni murdadas homojn, homojn kiel vi kaj mi, denove valorajoj estas neniigataj. Sed kial? La milito denove eksplodis sur la samaj kampoj kie oni povus ankoraŭ trovi la ostajojn de la antaŭaj senvivaj... herooj. La sango ne ankoraŭ tute sekigiĝis...

Leviĝu mortintoj, marŝu kripligitaj, vidu blindulojn, ekstaru de via malsanlito, vi, kies pulmoj oni ŝiris, kies korpoj oni teruris vi vivantaj mortintoj, kaj malbenu la kulpulojn. Malpermesu novan krimon!

Nigraj, malgajaj tagoj...

Abio.

AL LA FLANDRAJ ESPERANTISTOJ !

Flandrujo, malgranda lando, kiun mi antaŭ tri jaroj nur konis laŭnome, sed depost la ekkono de ĝi kaj ĝia popolo, ĝi ĉiam revokas min.

En Aŭgusto mi estis revenanta kaj partoprenanta la grandiozan pilgrimadon al Diksmuide, kies grandega turo parolas nur pri paco, tiu paco, kiun ni ĉiuj nun deziregas.

Guste en tiu-ĉi malfacila tempo mi turnas min al vi flandraj gesamideanoj : Kunhelpu por ke nia movado ne ekmortu, vigligu la grupvicon, interesigu viajn gekonatojn pri Esperanto, organizu kursojn, por ke novaj, freŝaj elementoj kunhelpu en nia batalo.

Ankaŭ via ligilo « Flandra Esperantisto » bezonas vian helpon, ĉar sen legantoj ĝia ekzistado estos nur mallonga.

Ĝeamikoj laboru, laboregu, por la venko de la paco kaj de Esperanto.

Anna Nedergaard.

LA SERĈIGEMULO PAROLAS.

Jen komenĉigas nova jaro. La antaŭa en pli bonaj kondiĉoj sin anoncis, sed intertempe kelkaj frenezuloj sukcesis rompi la pacon. Pro tio multe inter ni nun suferas. Esperu ni ke la nova jaro kiu tiel malbone anonciĝas finiĝos pli bone, kaj redonos la pacon al la tuta homaro.

Mi tutkore dankas ĉiujn solvintojn de la pasinta jaro por la daŭra kaj regula ensendado de la solvoj. Mi bone notis la maloftajn kritikojn de kelkaj inter ili, kaj promesas fari mian eblon eviti estonte, ĉiujn erarojn kaj... iom plifaciligi certajn enigmojn. Kiam mi donos ankoraŭ kalkulenigmojn, mi donos ilin kiel trian problemon, por ke la malbonaj kalkuldlistoj tamen ĉiumonate povu gajni du poentojn.

La intereso por la enigmoj, la lastajn monatojn, iom malpliigis. Ĉu eble la milito malkuraĝigis tiele kelkajn ke ili ne plu enrigardas la « Angulon » ? Ili malpravas. Estas precipe en tia nervkonsumanta tempo ke la solvado de kruĉvortoj kaj aliaj problemoj, por kelkaj horoj forgesigas ĉiujn kruelaĵojn nuntempajn, kaj retransviligos vian animon. Ne estas bone kaj sane ĉiam pensi al la nuna situacio kaj al ĉiuj malfacilaĵoj kiujn ĝi kunportas.

Krom tio, la solvado de la enigmoj precipe celas plialtigi la lingvan nivelon de la legantoj. Pro la deviga serĉado en votaroj kaj gramatikoj oni agrablamaniere ekzercas sian lingvon.

Al tiuj kiuj ne ankoraŭ solvis la problemojn, mi volas direkti kelkajn vortojn. Inter ili certe troviĝas kiuj diras : Mi ne ŝatas serĉi la solvojn, ĉar estas tro temporaba kaj servas al nenio. Mi ne tute konsentas pri tio. Temporaba ĝi ja estas, kaj precipe en la komenco. Sed se vi volus komenci kaj doni al vi iom da peno, vi spertus ke post kelka tempo la solvado iĝos multe pli facila kaj rapida. Estas nur kutimo. Ke ĝi servas al nenio, tio certe ne estas vera. Vi spertos, unue kaj precipe, ke post kelkaj ekzercoj via vortrezoro multe pliriĉiĝis. Due, ke tiu enuiga solvado iĝas baldaŭ tempopasigilo tre agrabla. Tria, ke vi gajnos premion danke al la poentosistemo kiun ni nun uzas. La gajnotaj libroj estas vere havindaj kaj valoraj.

Aliaj diras : mi ne sukcesas trovi la solvojn, ĉar la problemoj estas tro malfacilaj. Al ili mi konsilas serĉu la solvojn kun iu amiko aŭ amikino (sed serĉu tiam nur la enigmosolvojn). Du personoj ĉiam scias pli ol unu. Se eble vi ne trovas amik(in)on por vin helpi, vi demandu al la grup-estraro, serĉi la solvojn komune dum ia grupkunveno. Tiamaniere la estraro povas plenigi unu aŭ du horojn de la kunveno per agrabla kaj lerniga serĉado. Post kelkaj monatoj ĉiu el vi gajnos premion, kiu, laŭ interkonsento iĝos ĉies propra posedaĵo, aŭ pliriĉigos la grupbibliotekon. La tempon por solvi vi ĉiam havos, ĉar nur 2 monatojn (proksimume) post la apero de la revuo vi devas ensendi la solvoljn. Por eviti tro da sendkostoj vi rajtas ensendi dumonate kaj eĉ komune.

Kaj nun vi ĉiuj, karaj gesamideanoj, montru al mi, ke mi ne vane faris tiun alvokon.

Bonaj, originalaj problemaj estos ĉiam kun danko akceptataj, kaj aperos kun la nomo de la ensendinto.

Ankoraŭ unu peton mi havas. Interalie mi estas poŝtmarkkolektanto. Bonvolu afranku viajn leterojn filatelie. Dankon.

F. Volders.



HELPO-FUNDON POR FAMILIO ZAMENHOF

Mi ricevas de diversaj flankoj kortuŝajn informpetojn pri la Familio Zamenhof. Ni sciigis, ke samideano en Suda Francujo ricevis la permeson de la Franca Registaro por akcepti ĉe ŝi Fraŭlinon Lydia Zamenhof. Kion do ni povas fari por savi la ceterajn familianojn, kvin personojn, kiuj sen tio eble pereus samkiel la plejmulto de la pola judaro?

Tiu-ĉi fundo celas havigi al la Familio Zamenhof plej elementajn vivrimedojn eventuale ankaŭ monon laŭ la cirkonstancoj. Ĉia kunhelpo al ĉi-tiu fundo estas bonvenata. Sed urĝas!

La Estraro de U. E. A. kaj la ceteraj subskribintoj kun fido turnas sin al vi ĉiuj kun la kora peto : Helpu! La interna ideo, la sento de dankemo certe ne pereis spite ĉiuj okazintaĵoj.

La Esperantista Interhelpo kun la Estraro de U. E. A. klopodos por plej racia enmanigo de la helpo esperantista laŭ la kondiĉoj de la simila helpo por enloĝantoj de Polujo. Pri la sinsekvo de la klopodado estas informata la Esperantistaro per la gazeto ESPERANTO kaj ceteraj esperantistaj gazetoj kiuj bonvolos represi komunikojn.

La tuta helpo estas farata sen depreno por kostoj de administrado, por certigi maksimumon de rimedoj, sed ĉefe : helpu rapide kaj malavare!

Adreso : Fundo por helpo al Familio Zamenhof, Palais Wilson, Genevo, Svisujo.

NOVA SENSACIA SUKCESO EN HOLLYWOOD.

Jen, grandfilmo kiu enhavas originalan Esperantan kanton. « Paramount Studio » estas la tria granda filmfarejo kiu fariĝis amiko, subtenanto kaj uzanto de Esperanto. Nova populara kanto originale verkita en Esperanto estas kantata de du mondfamaj steloj kaj 100 geaktoroj.

Bing Crosby kaj Dorothy Lamour en la filmo « Vojo al Singapuro » perdiĝas sur tropika insulo. Por eviti la neceson fari la insulon aŭtentika en ĉiuj detalaĵoj, oni bezonis neŭtralan lingvon. Do la tre fama usona kantverkisto Johny Burke, kaj la filmfareja direktoro Harlan Thompson aprobis la uzon de Esperanto. Oni do verkis la originalan esperantan tekston por la nova kreita sudmarinsula festen- kaj danc-kanto. Gratulojn oni sendu grandamase per leteroj kaj kartoj al S-ro Direktoro Harlan Thompson, Paramount Studio, Hollywood, Kalif.

ESPERANTO-SMALFILM.

Voor de groepen die zelfstandig of in samenwerking met naburige groepen een mooie feestavond wenschen in te richten, kunnen wij ten zeerste aanbevelen de film te ontrollen : « Internacia Junularkunveno de Tutmonda Junular-Organizo ». Deze bijeenkomst had plaats van 7 tot 14 Augustus 1939 te Tervuren. Huurprijs : 2 fl. (twee gulden) per avond. Wendt U tot : T. J. O.-Filmservo, S-ro H. J. Schut, Koedijk (N. H.). Postcheckrekening nr. 310.334.

ESPERANTO IN RADIO.

Sedert enkele weken wordt de Esperanto-kronijk van den gewestelijken zender W. V. R. O. te Kortrijk, bezorgd door den heer Justus Merks, die deze tak overgenomen heeft van den h. Debrouwere, die ruim 5 jaar lang hiervoor in de bres stond.

Het dient vermelding dat h. Merks zich slechts sedert een jaar ten volle toegelegd heeft op de studie van Esperanto en daarbij ook van beroep radio-speaker is. In deze korte tijdsperiode is hij op eene volmaakte wijze met Esperanto vertrouwd geraakt.

De Esperanto-uitzendingen van de West-Vlaamsche Radio Omroep hebben nu plaats te 8,30 uur, ieder Zondag. Aan onze lezers welke dit station beluisteren raden wij aan hunnen bevindingen en wenschen hieromtrent over te maken aan W. V. R. O., Vaverijsstraat 20, te Kortrijk.



AALST. — Pioniro. — Malgraŭ la malfacilaj tempoj, niaj Pioniroj ankoraŭ regule kunvenas ĉiujauĉe.

La 29an de Novembro parolis -ano Roose el Bruĝo pri : « La historio de la mondligvo ». Estis tre interese, kaj ni ĉiuj esperas ke li ankoraŭ volos regali nin per tiaj interesaj temoj.

ANTWERPEN. — Flandrema Grupo Esperantista. — La grupo denove kunvenas regule kiel antaŭe, ĉiumerkrede de la 9a ĝis la 11a h. vespere.

Gratulojn. — Al nia klubano Domien De Gruyter kaj edzino naskiĝis bela filo kiu ricevis la nomon de Guido. La grupo elkore gratulas la feliĉajn gepatrojn. La redakcio de Fl. E. faras same.

E. K. I. — Merkredon la 10an de Januaro okazos kunveno. S-ano Van Ginder-taelen parolos pri « La psikologio de la murdo ». Ĉiuj geesperantistoj estos bonvenaj.

BRUSSEL. — Esp.-testo. — Okaze de l'Zamenhoftago la bruselaj Esperantistoj komune festis la naskiĝtagon de nia Majstro, sabaton la 16-an de decembro en la ejo « Het Groot Gulden Kasteel », St. Kathelijnestraat. Tiucele kunlaboris : « Esperantista Brusela Grupo » (R. B. L. E.), « Esperantista Sekcio de Mundaneo », « Laborista Esperantista Grupo Brusela » (F. E. T.), « Nia Estas la Estonteco » (Fl. L. E.), « Nova Vojo » (E-sekcio de tramista sindikato), « Brusela Sekcio de Fed. de Laboristaj E-istoj » (F. L. E.). La kompleta loka gruparo !

La programo estis laŭcirkonstanca kaj entuziasmigis la multnombrian ĉeestantaron kiu apenaŭ trovis lokon en la festejo kiu evidentiĝis iom tro malvasta. La Brusela Esperanto-Kanthono aŭdigis verkajojn de Schumann, Strauss, Verdi, Martini k. a. La artan ludadon de violonolisto D. Stock kaj la arĝentan voĉon de sopranino J. Van Autgaerden ni admiris i. a. dum solkantado de « Serenado » de Schubert en majstra E-traduko de F. W. Buenting. Estis vespero de arta ĝuo kaj la malĉeestintoj estas dankindaj pro tio, ke ili per ioresto cedis lokon al la entuziasmaj festintoj. La nunaj cirkonstancoj kaj la klopodoj de la senlaca aktivulo F. W. Buenting ŝajnas akceli oportunan kunlaboradon. Despli bone !

N. E. L. E. — Ni insistas ĉe la maldiligenta parto de nia sekcianaro por ke ili pagu la kotizon por la jaro 1940 (35 fr. por membro-abonantoj kaj 15 frankoj por simplaj membroj inkluzive la membreco de Fl. L. E.).

Ni rezervas surprizon al niaj membroj kartludemaj kaj planas same agrablan surprizon por niaj manĝemuloj. En la nuna malluma periodo ni deziras tutspeciale flegi la distran parton de niaj kunvenoj. Tial : venu regule !

RONSE. — La Paca Stelo. — Allo, Pacaj ge-Stelanoj, la manojn el la manikoj! Januaro por ni signifas : novan jaron, novan laboron kaj novan propagandon. Jen la programo : La 10an, ni hvos la ĝenerala kunveno, neniu forrestu, ĉar diversaj gravaj punktoj troviĝas sur la tagordo kaj oni komunikos novaĵojn pri estonta loterio inter la membroj de nia grupo kiuj pagis la kotizojn por 1940.

La 17an. — Io nova : « La krucvortoj ». Tre instrua kaj tre interesa.

La 24an. — La daŭrigo de la gramatikaj malfacilaĵoj, donata de s-ro Geenens.

La 31-an. — Estrarkunveno (nepre ĉeestu).

N. B. — La bibliotekisto sciigas ankoraŭfoje, ke la membroj dum tiu-ĉi vintra periodo multe legu, li estas feliĉa, povante anonci ke la libraro denove pliriĉiĝis de deko da novaj volumoj.

TURNHOUT. — La Turnhouta Espero. — Jarkunveno kaj Zamenhoffesto. Estas kutuno ĉiujare en decembro memori nian majstron D-ro Zamenhof. La nuna militstato ne permesis grandskalan feston. Tamen ni ne volis forpasiĝi tiun datrevenon tute nerimarkite kaj ni aranĝis agrablan festeton inter niaj geanoj.


Dum tiu sama vespero ankaŭ okazis nia jarkunveno.

La sekretarino laŭtleĝis koncizan raportan pri la laboro kaj okazintaĵojn de la pasinta jaro. La kasistino klarigis la financajn aferojn, kaj koniĝis, ke malgraŭ la multaj malfacilaĵoj, la budĝeto estas sen ŝuldaĵ. Do ĝenerale ni havis sufiĉe sukcesan jaron. La estraro kiu plenkonscie plenumis sian taskon estis reelektata.



Por ĉiu bona solvo ni notas unu poenton. 25 poentoj rajtigas al premio. Por ĉiu solvo uzu apartan folion, gluu sur ilin la koncernan konkurskuponon kaj indiku klare legeble vian nomon kaj adreson. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj sendataj antaŭ la 5a de Februaro rekte al s-ano Ferd. VOLDERS, Twee Nethenstraat 46, Antwerpen.

**PROBLEMO No 91.
STARLAMPO (KRUCVORTO).**



VERTIKALE :

1. Adverbo — adverbo.
2. Speco de lacerto (R).
3. Insektmanĝulo (R) — sufikso — dep. konj.
4. Prep. — unutaga, nelongdaŭra — sovaĝa bovo.
5. Ĉerisbrando (R) — persono — itala urbo (R).
6. Envolvpezo (R) — du samaj literoj — malgrando — bestido.
7. Okulkavo (R) — aparato por levi ŝarĝojn — versaĵo pri kampara vivo (R).
8. Posedanta scion, lertecon (R) — la sep muzikaj notoj (R) — pron. pers. — memagi.
9. Adverbo — busparto (R) — labor-ĉeso.
10. Kelkope (R) — duo (R) — Kiel 13 horizontale (2) — sufikso (adj).
11. Refaldida bordereto ĉe tuko (R) — — rivernimfo — moka esprimmaniero (R).

12. Nevariebla pronomo — nedifina pronomo — sufikso — kavalaria taĉmento.
13. Spasme kaj brue elspiri per la nazo (R) — komenco — ekciti la flarsenton (R).
14. Trinkajo (R) — neprovita supozo (R) — pron. pers.
15. Frue — infano (R) — nomo de litero.
16. Granda rampulo.
17. Kokina produkto — pers. pron.

HORIZONTALE :

1. Birdo (R).
2. Muzika teatraĵo.
3. Adverbo — marŝi.
4. Durada kaleŝo (R).
5. Kombinajo de sulfuro kaj metalo (R) — hispana arĝenta mono (R).
6. Metallo (R) — sufikso.
7. Dep. konj. — pron. pers. — senpense, naive kaj stulte rigardadi (R) — sufikso — M. K.
8. Dekdumono — Eŭropano — haŭtkreskaĵo.
9. Regnestro de Arabujo — galgusta — Eŭropano.
10. Kvinlingre — sufikso — prep. — malobservo al relegia leĝo.
11. Grandega pratempa besto (R) — modelo el papero.
12. Kviete — konjunkcio — dekalitro — enuigi.
13. Arbo (R) — maceri tekseblan planton en likvaĵo (R) — manĝebla molusko — du samaj vokaloj — objekto.
14. Perfekta en la plej alta grado komando — proskribi.
15. Du samaj konsonantoj — pron. pers. — ludkarto — konj.
16. Sportilo (R).
17. Pron. pers. — nedifina objektivo.
18. Daŭri — esti blanke varma (R).
19. Krokodilo.
20. Profite uzi — pozitiva elektrodo.
21. Opinii ion vera — loko en Kongo (R).
22. Sovaĝa besto — birdo (R).

**PROBLEMO No 92.
KALKULPROBLEMO.**

Okazus granda publika gimnastikekzercado. La diversaj grupoj estis alvenintaj unu horon antaŭ la komenco kaj la gvidanto de la komuna ekzercado ricevis de ĉiu grupgvidanto la nombron de partoprenantoj. Kiam li kalkulis la tutan nombraron li iomete embarasiĝis. Li nome konstatis ke se li metus ĉiujn en 2 vicojn, li havus unu tro. Ankaŭ en 3 rangoj restus unu. Li poste klopodis en 4, 5, 6 kaj 7 vicojn sed ĉiam kun la sama rezultato. Ĉiam restis unu persono. Kiam li preskaŭ jam malesperis, li finfine trovis bonan solvon, metante ilin kvadrato. Tiam neniu restis. Kiom da gimnastikistoj partoprenis al tiu ekzercado?

PROBLEMO No 93.

Mi estas grasa substanco.
Senkapigita mi iĝas organo de mamulino.
Resenkapigita mi iĝas planedo.
Kaj denove senkapigita mi nur estas parto malgranda.

SOLVO DE PROBLEMO 84.

HORIZONTALA : Infinit, odo, mur, bleki, tuber, tre, troan, vek, re alt, ar, etrusk, umbelo, ale, art, atripl, spioni, ne, alo, ek, okr, liano, avo, sorik, ostro, kot, tra, drapiri.

VERTIKALE : Trepano, bret, teks, ole, rar, rok, ide, tulip, rod, nokt, sep, litre, irak, laik, ia, ol, la, op, tatu, sono, imun, map, ostr, tub, ebria, tri, rev, eto, ara, real, nevo, kroniko.

SOLVO DE PROBLEMO 85.

AERO — KOLO — ORDO — NAFTO — MAJO — PAKI — LINO — RANO
— DEK — ORA — NI — PLATO — PLANO — DERMOJ — RETO — CIFERO.

MAJORANO — ORAKOLO — NAFTALINO — DEKRETO — PAKIDERMOJ
— AEROPLANO — CIFERPLATO — ORDONI.

M-O-N-D-P-A-C-O.


SOLVO DE PROBLEMO 86.

Multaj solvoj ebligis. Inter alie

1465	1430	1460	1940	2085	3065	3560
3465	2438	5460	3940	1085	4065	4560
2905	5860	2830	2750	3745	2715	1720
7835	9730	9750	8630	6915	9845	9840

Oni povas interŝanĝi la unuajn ciferojn de la unua kaj tri linio.

Ensendis bonajn solvojn, Ges. TOP (3) — POLLET (3) — KEVERYN (2)
— SENAVERE (2) — ROOSE (2) — ISERENTANT (3) — COUWENBERG (3) —
— VAN DER MAST (3) — VAN TUYKOM (2) — D'HONDT (3) — VAN MUL-
LEM (3) — PITTOORS (3).



Responde al diversaj demandoj mi sciigas la jenon :

★ Al ĉiuj kiuj korespondas kun militantaj aŭ mobilizitaj landoj estas urĝe petatoj skribi tre klare per presliteroj en la maldekstran supran angulon de la koverto :
KORESPONDO EN ESPERANTO.

★ Al militantaj landoj ne plu estas permesata sendi iajn desegnaĵojn, ilustritajn poŝtkartojn, fotojn aŭ poŝtmarkojn.

Sendajojn kiuj ne konformas al tiuj kondiĉoj estos konfiskataj de la cenzuro.

★ Konforme al informoj ricevitaj, ke al loĝantoj en Britujo kaj Francujo estas tute malpermesite iel interrilati kun loĝantoj en lando malamika, estas do rekomendinde provizore ne plu propagandi la servon de per esperanta perado de leteroj.

★ La Franca Registaro malpermesis ĝis nova ordono la aperon de ĉiuj gazetoj kaj publikaĵoj en esperanto (en, do ne pri esperanto).

Verŝajne la decido de la Franca Registaro estas nur provizora.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

(Vereeniging zonder Winstoogmerken.

Staatsblad 20-12-1930. Akte 1227)

P. Van Humbeekstraat 3, BRUSSEL-WEST.

Postcheck : 3268.51

ROMANSERIO 1940

Al ĉi tiu numero de nia organo ni aldonas prospekton pri « Romanserio 1940 ». Tiu serio konsistas el ses literaturaj verkoj de bonfamaj verkistoj diversnaciaj. Ĉiu libro ampleksos proks. 250 p.; ili aperos presitaj sur senligna papero kaj tuttole binditaj kun trafa titolbilda ornamo. La serio aperos sub lingva kontrolo de Literatura Komitato. La prezo estos proks. fr. 32.—.

Abonantaj je la tuta serio tamen pagos nur fr. 21.— (fr. 125.— por la kompleta serio) kaj do ĝuos rabaton de proks. 40 %. Abonantoj krome rajtas pagi laŭ elekto en unu foje aŭ en partoj (vidu la aliĝilon de la prospekto).

Inter la anoncitaj libroj niaj literaturamaj membroj sendube trovos plurajn verkojn kiuj al ili interesas. Plej rekomendinda solvo tamen estas aboni la tutan serion, ĉar ofte okazas, ke libron kiun oni opinias ne tre valora antaŭ la aĉeto, oni alte taksas post la akiro.

Tiuj kiuj deziras anstataŭi unu aŭ maksimume du verkojn de la serio 1940, rajtas tion fari elektante ĉu unu, ĉu du volumojn el la antaŭa serio. En tiu serio (1939) aperis sinsekve :

I. TURGENJEV : Patroj kaj Filoj, el pola lingvo tradukis Kabe.

J. LAST : La Hispana Tragedio, el nederlanda lingvo tradukis Degenkamp.

I. SILONE : Fontamara, el itala lingvo tradukis Angelo kaj J. van Scheepen.

A. LATZKO : Homo en Milito, el germana lingvo tradukis Ch. Minor.

H. SZEKELY-LULOFS : Kulio, el nederlanda lingvo tradukis P. J. Makkinje.

V. KOROLENKO : La Senlingvulo, el rusa lingvo tradukis M. Sidlofskaja.

PREMIO : Abonantoj kiuj ensendas la aliĝilon kaj la pagon aŭ unuan partopagon antaŭ la 1-an de Februaro al Flandra Esperanto-Instituto, rajtas premie ricevi belan origanalan romanon kontraŭ alpagado de la nuraj sendkostoj kaj ev. bindkostoj.

La libroj aperos alternmonate : la unua en januaro, la dua en marto k.t.p.

Ni rekomendas al ĉiuj atente tralegi la prospekton kaj, se la serio plaĉas, senprokraste resendi al F. E. I. la aliĝilon !

Verko de alta valoro !

Por poezi-amantoj vera regalo !

SE AŬSKULTAS LA ANIMO...

Poemkolekto el la verko de GUIDO GEZELLE

El flandra lingvo majstre tradukis : H. VERMUYTEN


Kun portreto de la aŭtoro, sur senligna papero kaj en plaĉa vesto.

Tiu ĉi verko montros al vi la admirindajn belsonecon, flekseblecon kaj esprimriĉon de nia internacia lingvo. Traduko de l' subtila lingvaĵo de nia granda flandra poeto kiu indas lokon en via biblioteko !

BROSURITE : fr. 10.—.

BINDITE : fr. 15.—

MENDU ĈE VIA LIBRO-SERVO : F. E. I.



KUPONO
por la 91a
PROBLEMO

KUPONO
por la 92a
PROBLEMO

KUPONO
por la 93a
PROBLEMO

OOSTENDE

« Reĝino de Flandra marbordo »

HOTEL METROPOLE

Kerkstraat 32

75 KOMFORTAJ ĈAMBROJ
kun fluanta akvo,
varma kaj malvarma

Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo.

Kuŝrejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano SNYKERS
havas la plej bonajn rekomendojn
kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ H. & H. BRAEKEVELT

ALLE DRUKWERKEN VOOR HANDEL, VEREENIGING
& FAMILIE (ROUW) ● IMMER KEURIG DRUKWERK
AUTOMAAT-INRICHTING VOOR GROOTE OPLAGEN

STATIEDREEF, 177 (TEL. 1080) ROESELARE

BESCHIKBAAR

VOOR ADVERTENTIE

HERBERG

't **VLAAMSCH HUIS**

GROOTE MARKT 16, BRUSSEL

BONGUSTAJ TRINKAĴOJ

Flandre agrabla atmosfero
Diversaj salonoj por societoj

Ejo de N. E. L. E.
(SEKCIO BRUSSEL DE FL. L. E.)

PRESEJO

"**HOOPER OP**"

Vrijheid 101
ARENDRONK

ZORGEME ELFINITA PRESADO

FAVORPREZOJ POR ESPERANTISTOJ

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT
Carnotstraat 70 Antwerpen

PLEJ BONAJ TRINKAĴOJ
Salonoj por societoj
Malvarmaj mangaĵoj
Bonega servado

EJO DE :
Flandrema Grupo Esperantista
(SEKCIO ANTWERPEN DE FL. L. E.)

HELPU VIAN ORGANIZON
KAJ FARU VIAN DEVON

per la

VARBADO DE NOVAJ MEMBRO-ABONANTOJ!

Ĉiu Esperantisto-Propran Bibliotekon!

Sub tiu devizo nia libro-servo jam dum pluraj jaroj funkciis kaj pasintjare per eldono de nia unua romanserio ni ankoraŭ akcentis tion. Tiu aranĝo ja ebligis al vi je malalta prezo aĉeti la plej novajn librojn per monataj partopagoj. Tiu aranĝo ebligis al ni liveri al vi je malalta prezo librojn de bonfamaj aŭtoroj, bone presitajn sur bonkvalita, senligna papero kaj bele eldonitajn, ĉar pro via abono ni jam antaŭ la eldono certas pri la vendo. Ĉar do tiu eldonado fariĝas senriska kaj la investita kapitalo en kelkaj monatoj revenas, ni povas liveri je malaltega prezo unuakvalitan produkton. Mallonge ni hezitis ĉu, en la nuna milita tempo, daŭrigi tiun eldonagadon. La plej gravaj Esperanto-eldonejoj jam ĉesis produkti. Sed la fakto, ke eĉ pli ol antaŭe ni bezonegas spiritan nutraĵon por povi kontraŭstari la barbarismon ĉirkaŭ ni, decidigis nin tamen fari tion, konvinkite, ke la Esperantistoj alte taksos tion kaj ne seniluziigos nian fidon.

En la sekvantaj paĝoj ni do anoncas nian *duan romanserion*. Ankaŭ ĉi tiu serio enhavas tradukon de nia klasikulo **Kabe**, la stilisto, kiu restas modelo por ĉiuj, kiuj venis kaj venas post li; G. Saville tradukis por ni la konatan vivhistorion de M. Gold „Judoj sen mono“; el dana lingvo, en traduko de Friis kaj Jensen, aperos „La Taglaboristoj“ de H. Kirk; L. Spierer tradukis el hungara lingvo de Kássak: „La vojoj estas nekonataj“; ni reaperigos la tradukon faritan de la Majstro „La Batalo de l'Vivo“ de Charles Dickens; kaj fine ni eldonos novan specon el la nederlanda literaturo: „La Perfido“ de A. M. de Jong, tradukita de W. F. Kruit.

Jen do varia serio de 6 literaturaj verkoj, kiun ni ofertas al vi kontraŭ malalta kotizo de nur 65 c. monate aŭ f 1.25 dumonate. Ĉiu libro estas tolbindita kun ora aŭ kolora titolbildo.

Neniam vi aĉetis tiajn altnivelajn, bele eldonitajn romanojn je tiu malalta prezo.

H. Sienckiewicz La Lanternisto

kaj aliaj prozaĵoj

el pola lingvo tradukitaj
de D-ro Kabe.




„La tradukado de bonstilaj literaturaĵoj, precipe polaj, formis la lingvon Esperantan“, diris iam D-ro Kabe.

Malgraŭ la fakto, ke liaj tradukoj aperis unuafoje antaŭ tridek jaroj, ilia stilo, simpla kaj klara, ankoraŭ nuntempe povas servi kiel modelo. Jen la motivoj, kial ni entreprenis la reeldonon de kolekto de belaj prozaĵoj, kiujn li tradukis el pola lingvo. La legintoj de liaj tradukoj: „Patroj kaj Filoj“ kaj „La Faraono“ certe aplaŭdos la reaperon de tiuj ĉi prozaĵoj, kiujn ni kolektis el diversaj antaŭmilitaj eldonaĵoj: el la iama revuo „Lingvo Internacia“, el „Internacia Krestomatieto“ kaj fine la *tutan* kolekton de prozaĵoj, kiuj aperis libroforme sub la titolo „Pola Antologio“.

Dum multaj jaroj tiuj eldonaĵoj jam ne plu estis akireblaj kaj inter la nuntempaj Esperantistoj tial tiuj liaj tradukoj estas apenaŭ konataj.

Pri la libroj aperintaj en nia unua serio aperis multaj, laŭdaj recenzoj en ĉiuj gravaj esperanto-gazetoj. Jen la opinio de „Heroldo de Esperanto“ pri „Patroj kaj Filoj“ tradukita de Kabe:

.....la libro estas tre bone eldonita;tre rekomendas la libron..... Stilo kaj traduko de Kabe estas admirinde perfektaj.”



Michaël Gold. Judoj sen mono.

El angla lingvo tradukis
Georgo Saville.

Kortuŝa priskribo de la vivo de la judoj, elmigrintaj el orient-Eŭropo, en la malriĉulaj kvartaloj de Nov-Jorko, la fifamkonata „East Side“.

Gold estas tio, kion ni kutimas nomi „denaska rakontisto“. Li rakontas al ni la historion de sia propra vivo. Siajn infanajn kaj junulajn jarojn en la urbego, meze de mizero, krimo kaj prostituado; la laboron en la mallumaj, malpuraj laborejoj, ĉion li konigas al ni sincere, malkaŝe kaj en fidinda maniero. Ni ekkonas la malgrandan bubon, kiu kun siaj kamaradoj vivaĉas sur la malpuraj stratoj, for de ĉia beleco kaj kiu la naturon konas nur de la lernejoj lecionoj.

La patro, nepraktikulo, kun obstina optimismo kredadas, ke iam venos ankaŭ por ili pli feliĉa sorto. Li estas fantaziplena homo, kiu rakontadas en familia rondo pri sia juneco en la malproksima Rumanio, kaj pri veraj kaj imagitaj aventuroj. Tiuj travivaĵoj, rakontataj kiam la tuta konatularo de la familio sidas ĉirkaŭ la tablo kaj streĉe aŭskultas, estas plenaj de poezio.

La patrino, kies bildon Gold pentras tiom vereca kaj amplena, kia nur infano povas skizi sian patrinon.

Romanoj, kiuj rakontas al ni pri la vivo en Usono, kutime skizas al ni la sukcesplenan vivon de tiuj, kiuj sukcesis de gazetvendisto fariĝi milionulo. Gold montras al ni alian flankon de la „Nova Mondo“, kiu impresas al ni pro sia vereco.

Charles Dickens. La Batalo de l'Vivo.

Esperantigita de D-ro. L. L. Zamenhof.

Tria eldono

Ilustrita per la desegnaĵoj el la originala anglalingva eldono.



Unu el la plej famaj rakontistoj el la 19-a jarcento certe estas la anglo Ch. Dickens. Kiu el ni neniam aŭdis pri David Copperfield, Samuel Pickwick, Oliver Twist kaj multaj aliaj, de li kreitaj, figuroj? En ĉi tiu novelo ni rekonas la tipan rakontmanieron de Dickens, lian amuzan priskribon de liaj diversaj figuroj, lian karakterizan stilon.

Sur loko, kie cent jarojn antaŭe okazis furioza batalo, nun vivas trankvile la familio Jeddler: la patro kun du filinoj Grace kaj Marion. Alfred estas la fianĉo de Grace, sed kiam Grace rimarkas, ke ankaŭ Marion amas lin, ŝi ofertas sin al la fratino. Kun la helpo de Warden, ŝi forkuras el la patra domo. Kiam post jaroj ili konkludas, ke Marion mortis, la amo de Alfred transiras al Grace kaj li edziĝas kun ŝi.

Por ni, Esperatistoj, tiu libro havas specialan valoron. Ĝi estas ja la **unua** traduko farita de D-ro Zamenhof mem. La rakonto aperis en 1891a en la tiama gazeto „La Esperantisto”.

D-ro Zamenhof tradukis ĝin laŭ germanlingva traduko. Farita en tempo, kiam Esperanto ankoraŭ estis malmulte uzata kaj praktikata, ni, Esperantistoj de nova generacio, renkontas en ĝi esprimojn nun ne kutimajn. Sed kompreneble ni nenion ŝanĝis en ĉi tiu traduko, sed represos ĝin en la originala formo. Ĉiu, kiu deziras posedi la plenan verkaron de la aŭtoro de Esperanto, havigu al si ĉi tiun, delonge elĉerpitan, tradukon! La eldono, laŭ aranĝo kaj ekstera aspekto estos surprizo!



Lajos Kassák

La vojoj estas nekonataj.

El hungara lingvo tradukis

L. Spierer.

Kassák estas unu el la plej bonaj kaj konataj hungaraj verkistoj nuntempaj. Li venas el laborista familio kaj laboristo li restis. Li skribas pri la vivo, la batalo kaj la suferoj de la laboristaj familioj.

Kiam ni skribis al la verkisto L. Székely, (kiu i.a. tradukis nederlanden la verkon „Periferio” de Kassák) por peti lian konsilon pri „La vojoj estas nekonataj”, li respondis al ni: „Mi konas preskaŭ la tutan verkaron de Kassák, sed ankoraŭ neniam legis de li nebonan verkon. Ĉiuj liaj romanoj havas maldekstran tendencon.”

La verko de Kassák estas bela socia romano kaj ni ĝojas, ke ĝi trovis lokon en nia serio!



Ĉi tiu vinjeto en niaj literaturaj verkoj certigas vin pri bonaj lingvo kaj stilo.



A. M. de Jong.

La Perfido.

El nederlanda lingvo
tradukis W. F. Kruit

La verkisto estas unu el la plej famaj en Nederlando kaj precipe la romano, kies tradukon ni nun prezentas al la esperantistaro famigis lian nomon.

Merijntje Gijzen, la ĉefulo en ĉi tiu romano, estas malgranda, 8-jara knabo, unu el la multaj infanoj de terkulturista familio, kiu loĝas en apud-rivera vilaĝo en suda Nederlando.

Lun tagon Merijntje, malproksime de la hejmo, vundetas sian kruron kaj ne povas promeni plu. Tie lin trovas la malbonkonata ŝtelĉasisto „Kruĉo”, kaj li portas lin hejmen sur la ŝultroj. El tiu renkontiĝo rezultas reciproka amikeco; ili ofte estas kune kaj Merijntje rakontas al sia granda amiko pri ĉio, kio okupas lian pian, reveman animon.

La libro enhavas multajn ĉarmplenajn kaj humorajn paĝojn. Ni nomu nur la ĉapitron, en kiu Merijntje, la helpanto de la pastro ĉe la meso, ŝtelas kun la pli aĝa frato, en malluma vespero, fruktojn el la parohestra ĝardeno! Tiam „Kruĉo”, la sendiulo, vizitas la pastron, por pledi por la malgranda pekulo! Sed eble pleje trafas nin la tragedian finon, kiam Merijntje, nekonscie, perfidas sian amikon, kiu faris krimon, kaj pro la akuzo ago de Merijntje (kiu ne komprenis, kiucele la polico uzas lin), perdas la obstinon por plu persisti en sia malkonfesa sinteno.....

„Kruĉo” oni forkondukas al la malliberejo kaj Merijntje restas sola.....

NIA PREMIO POR FRUALIĜINTOJ



Pasintan jaron ni donis al niaj unuaj abonantoj malgrandan premion. Ni rimarkis, ke oni ŝatas tion kaj ni penis por ĉi tiu jaro denove veni kun tia surprizo. Kaj ni bonege sukcesis en tio.

Ni donacos al ĉiu abonanto, kiu sendos al ni sian aliĝilon antaŭ la 30-a de januaro 1940a ekzempleron de la *originala* romano:

Douglas P. Boatman.

La nekonata konato.

Ĝi estas „mistera rakonto”, kaj pro tio ni nenion diros pri la enhavo, nur ke la lingvo estas simpla kaj bonstila kaj tuj ĉe la komenco jam kaptas la atenton de la leganto kaj ĝin tenas ĝis la lasta paĝo. Eĉ komencanto ne povas ĉesi la legadon!

Tiuj, kiuj deziras nur ĉi tiun libron kaj ne abonas la „duan romanserion” pagas la nunan vendprezon de f 1.20 por ekzemplero broŝurita aŭ f 1.80 por bindita ekzemplero.

Niaj abonantoj ricevos la libron broŝurita kontraŭ pago de 10 cendoj por aŭfranko kaj administraj elspezoj. Se vi deziras binditan ekzempleron (blutola bindo kun ora surpriso) vi devos por la bindo ankoraŭ aldoni 30 cendojn.

Sed ni ripetas: nur niaj abonantoj ricevos la libron je tiu escepta kondiĉo kaj nur po unu ekzemplero.

Bijvoegsel aan „Flandra Esperantisto” van Jan. 1940.

NOVA ROMANSERIO

SUB KONTROLO DE LA LITERATURA KOMITATO DE F.L.E.



POR 15 CENDOJ SEMAJNE

ALIĜILO.

Subskribanto

adreso

loĝloko

abonas la „Romanserion 1940” kaj sin devigas dum la jaro 1940 akcepti la en ĉi tiu prospekto anoncigitajn librojn kontraŭ pago de

jare 125 belgaj frankoj ¹⁾

duonjare 63 belgaj frankoj ¹⁾

dumonate 21 belgaj frankoj ¹⁾

monate 11 belgaj frankoj ¹⁾

a. al poŝtĉekkonto 3268.51 je la nomo de F.E.I. Kortrijk. ¹⁾

b. per poŝtmandato ¹⁾

Li deziras ricevi la premion „Douglas P. Boatman — La nekonata konato”

broŝuritan kontraŭ pago de 2 b.fr. ¹⁾

tolbinditan kontraŭ pago de 7 b.fr. ¹⁾

Dato:

Subskribo:

.....
¹⁾ Bonvolu pleniĝi ĉi supran aliĝilon kaj trastreki tion, kion vi ne deziras. *Se vi nenion aldonas*, vi povas resendi la aliĝilon presaje.

Vi bonvolu resendi la aliĝilon rekte al

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO.

Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Gedrukt in Nederland

Hans Kirk.

La Taglaboristoj.

El dana lingvo tradukis

L. Friis kaj W. Jensen.



La taglaboristoj en iu dana vilaĝo vivadas efektive „potage”, apenaŭ sciante hodiaŭ, kion ili manĝos morgaŭ. La mizero, en kiu ili naskiĝis, treniĝas kun ili tra ilia tuta vivo: nesufiĉe pagata laboro somere, plena senlaboreco vintre. Kaj nenia distro krom la vilaĝaj ĉiutagaĵoj kaj klaĉado. Konscio pri propra valoro al ili mankas.

Iun tagon vizitas la vilaĝon geologoj kaj esploras la teron. Scivole la taglaboristoj rigardas ilian laboron, nekomprenante. Nova temo de babilado..... Post nelonge estas konstruata granda cementfabriko. Malaperas la trankvilo de la vilaĝo. Ŝanĝiĝas la vivo de la taglaboristoj. Ili fariĝas laboristoj industriaj. La laboristoj venintaj el la urbo, pli kleraj ol siaj kamparaj kolegoj, instruas al ili idealojn de homa digno, montras al ili vojon al pli bona estonteco. Fondiĝas sindikato.....

Vive kaj kortuŝe Hans Kirk skizas la vivon de ĉi tiuj taglaboristoj kaj ĝian ŝanĝiĝon.

.....
Ni citas nur unu el la multegaj dankesprimoj, ricevitaĵoj de la abonantoj de nia unua serio:

.....mi devas konsenti ke la eldono kaj la enhavo de la libroj estas belegaj kaj bonege zorgitaj. La novaj libroj estas ĉarma akiro por mia libro-ŝranko kaj la enhavo donas al mi multe da plezuro kaj studado.”

J. A. IJ. Batavia.